# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 4 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 4

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## La disvastiĝo de esperanto inter la liberpensularo tutmonda

Kvankam jam en jaro 1906 dum internacia kongreso de la liberpensuloj en Buenos-Aires oni estis akceptinta poresperantan rezolucion, tamen la liberpensa mondo ĝis fino de la mondmilito ignoris la mondhelplingvan demandon. Por propagandi esperanton inter liberpensaj rondoj, la liberpensaj esperantistoj fondis societojn. Antaŭ la milito ekzistis la organizo "Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj", kiu eldonis monatan gazeteton "Libera Penso". En la milito endormiĝis la nomita organizo. Post la milito estis fondata la esperanta organizo "Internacia Ligo de Liberpensuloj" kun la celo esperanton meti je la servo de la liberpensularo. Oni ankaŭ eldonis dumonatan gazeton "Liberpensulo". Pro financaj kaŭzoj la gazeto neregule aperis kaj post kvarjara ekzisto la organizo estis likvidata.

La laboroj de la liberpensaj esperantistoj estis sukcesplenaj. Per senlaca propagando la neesperantista liberpensularo komencis atenti esperanton kaj la esperantan movadon. Kelkaj organizoj subtenis la movadon morale kaj mone. En diversaj gazetoj aperis artikoloj pri kaj per esperanto, ankaŭ esperantlingve; kelkaj publikigis eĉ tutan esperanto-kurson. Gvidantoj de la liberpensa mondo lernis esperanton kaj la sekvantaj gazetoj liberpensaj portas la surpreson "Oni korespondas esperante": Le Matérialiste (Bruxelles), Bezboĵnik (Moskvo), Der Prol. Freidenker (Essen), De Vrijdenker (Amsterdam), Bezvirnik (Ĥarkov), Der Freidenker (Vieno). La pola gazeto "Zycie Wolne" publikigas la liston de enhavo ankaŭ esperantlingve.

Dum la ĉefkunveno de la diversaj liberpensulaj organizoj oni esprimis sian simpation por la internacia helplingvo esperanto. La unua kongreso de la proletaj liberpensuloj (IPF) akceptis jenan rezolucion:

"La unua kongreso de la proletaj liberpensuloj 1924 en Vieno elparolas sin por la neceso de la internacia interkompreniĝ-lingvo (esperanto) pro praktikaj kaj idealaj kaŭzoj kaj energie subtenos ĉiujn tiurilatajn agojn."

La ĉefkunveno de la Liberpensula Asocio en Aŭstrio (1-a—2-a de feb. 1925 en Loeben) akceptis jenan decidon:

"Esperanto kiel proleta kulturmovado estas akceptata en la statutajn celojn de la asocio."

La kvina landkonferenco de la pola Liberpensula Asocio akceptis ankaŭ poresperantan rezolucion:

"La landkonferenco de la Pola Liberpensula Asocio konstatis, ke la malekzisto de komuna internacia lingvo malfaciligas la interkompreniĝon inter la proletaro kaj per tio ankaŭ la kreon de internaciaj rilatoj. Ĝi decidas fari agojn celantaj la enkondukon de esperanto en la lernejoj. La konferenco alvokas ĉiujn laboristajn organizojn al propagando de esperanto kaj aranĝo de esperanto-kursoj."

La literaturo liberpensa esperantlingva, ankoraŭ ne estas multnombra. Ĝis nun aperis kelkaj libroj kaj broŝuroj; mi citas: Renan, La vivo de Jesuo, Krimoj de dio, Kio estas monismo, Kontraŭ dio, Kion vualas la biblio.

Hodiaŭ denove kolektiĝas la liberpensuloj-esperantistoj en la proleta esp. organizo "Sennacieca Asocio Tutmonda", formante "Liberpensulan Sekcio". Ĝi aperigas ĉiumonate "Liberpensula Paĝo"-n en la gazeto "Sennaciulo" kaj eldonas dusemajne Liberpensulan Gazetservon, kiu estas regule forsendata al la sekcianoj, liberpensaj organizoj kaj gazetoj. Dum la venonta mondkongreso de "Sennacieca Asocio Tutmonda" estos aranĝata fakkunsido de la liberpensuloj. La kongreso okazos dum 4.—10. aŭgusto en Leipzig.

Do la eldiroj pruvas, ke esperanto estas ŝatata kaj praktike uzata de la liberpensa mondo. Ofte oni aŭdas argumentojn kontraŭ esperanto. Sed pripensu! Ni ĉiam atente observu la kontraŭulojn. Se la starantoj sur la alia barikado uzas pli bonajn batalilojn ol ni, ni ankaŭ havigu al ni tiajn pli bonajn batalilojn. La burĝa mondo starigis la plej novajn eltrovaĵojn je sia servo, ekz. filmon, radion, ankaŭ esperanton. La katolikoj, kristanoj, spiritistoj, bibliostudantoj, teozofoj kaj aliaj sektoj uzas vigle esperanton. Ili eldonas internaciajn esperantajn gazetojn, aranĝas internaciajn kongresojn, eldonas grandnombran esperanto-literaturon — eĉ la tuta biblio estas tradukita en esperanton — aranĝas diservojn esperantlingve; eĉ la nova japana religia movado OOMOTO havas migrantajn propagandistojn, kiuj per helpo de esperanto disvastigas sian idearon en tuta mondo.

Pro la vigla uzado de esperanto ĉe niaj kontraŭuloj oni povus konkludi, ke esperanto estas danĝero por la libera penso, se ni ne uzus ankaŭ la neŭtralan helplingvon.

Ni esperantistoj batalas kontraŭ la lingva superstiĉo, kiu estas en la malĝusta, sed populara opinio ke la viva lingvo estas io absoluta, konstanta, kaj ke artefarita lingvo ne estas vivebla. Esperanto estas sendube fenomeno de la 20-a jarcento. Kiel per la laboro de la liberpensaj organizoj la scienco de Kant, Laplace, Darvin ktp. la homaron liberigas de la religia superstiĉo, tiel ankaŭ dank' al la laboro de la esperantistoj la moderna kompara lingvoscienco la homaron liberigas de la lingva superstiĉo. Ĝis nun la lingvo regis la homon. Per Esperanto la homo regas la lingvon, decidas ĝian strukturon kaj evoluon.

---

### El Sovetio

La Bulteno de CK de SEU enhavas nun regule "Ateistan Angulon". En n-o 3 ni legas, ke la ruslingva gazeto "Bezboĵnik" (Sendiulo) jam havas kelkajn korespondantojn-esperantistojn en eksterlando. Dum tri monatoj la redakcio ricevis el eksterlando ĉ. 30 artikolojn. Du artikoloj de Lenin pri religio baldaŭ laŭ iniciato de Centra Oficejo de Ateista Unio aperos en la serio "Komunista Biblioteko" eldonata esperantlingve en Moskvo. La kajero estos havebla ankaŭ ĉe nia Sekcio.

---

### Sekcianoj!

Nia Liberpensula Gazetservo plej bone funkcias en Germanio, Polio kaj Sovetio. La mondo liberpensa ŝajne nur ekzistas en la tri nomitaj ŝtatoj; el la aliaj landoj alvenas nenio. Ni petas vin insiste: ne nur estu paganta sekciano, sed kunlaboru vigle kaj sendu koncizajn notojn pri gravaj okazintaĵoj ĉe niaj amikoj aŭ malamikoj.

---

### Sekcianoj!

La fakkunsidon dum la venonta SAT-kongreso aranĝos nia Sekcio. Demandojn k proponojn adresu al nia sekretario. Literaturon liberpensan liveras laŭ prezoj de la eldonistoj nia Sekcio; mendu ĉe ni; tiamaniere vi financigas nian entreprenon. Kiel kunlaborantojn ni notis jenajn K-dojn: 2798, 259, 8130, 5627, 150, 8740, 1225, 5129, 12 439 k K-don en Zeist.

---

**En katenoj de la maljusteco**

**Virina Krestomatieto**

40 paĝoj. Prezo: 0,60 mk. g.

**Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).**